



KUSPE

"KUSPE" Oficiala informilo de Eŭska Esperanto-Asocio
Euskalerriko Esperanto Alkartearen aldizkaria

KUSPE. N-ro 14. PRINTEMPO 96



UTILAJ ADRESOJ

ELDONAS: Eŭska Esperanto-Asocio

Zapateria 29.
E- 01001. Vitoria-Gasteiz.



KUNORDIGANTO : Rafael Blanco Arbe.

Larrainbide 3, 3.ezk.
E-31800. Altsasu. Tlf. (9-48) 56 38 99.



ALAVO. ALAVA ESPERANTO-ASOCIO.

SEKRETARIO. David Sánchez Agirregomezkorta
Pintor Pablo Uranga 5, 1. C.
Vitoria-Gasteiz. Tlf. (9-45) 22 45 50



BIZKAJO. Grupo Esperantista de Bilbao

Barrenkale Barrena 7, 1.esk. Bilbao.
E-48005. Tlf. (9-4) 416 44 92. (19-21 horoj.)

NAFARO. Asociación Esperanto Navarra.

Casa de la Juventud. Gaztediaren Etxea.
Sangüesa 30. E-31500. Pamplona-Iruñea.



La enhavo de artikoloj ne
nepre kongruas kun la opinio
aŭ agadprincipoj de la Asocio.

Koxkorrone Taldeanoj
enpaĝigis la kovrilon
kaj kontraŭkovrilon.



SALUT-VORTOJ

Kune kun la alveno de la printempo nin (la membraron de eŭska e-o asocio) atingis sezono por profunde debati pri la situacio de la loka grupo. Ni volus, ke ĝi tiu bildo jarsezona estu metafora por la agado kaj vivo de la asocio en la venontaj jaroj kaj ke tiu printempo nia estu 68a france maja, portugale diantorevolucia aŭ kristane pentekosta, nome, rava, kreiva, streba kaj fruktodona. Jen la deziroj, la faktoj eble ne estos tiel vastaj, tamen ni alfrontis la unuan teorion paŝon, nur en la dua, pli praktika stupo, ni pruvos la disvolvigon de tiu proceso.

Aliflanke, kiel legindas sur la kovrilpaĝo, la verkisto Aitor Arana, intervjuita de Joxe Mari Sarasua, sciigos al ni sian opinion pri la esperantaj movado kaj literaturo. Estas ĝi tre interesa kaj suka konversacio, kie la aŭtoro diferencigas la konceptojn "esperantano"n kaj "esperantisto"n. Des pli ravo-veĝa estas ebla eldono de verko de Bernardo Atxaga en esperanto aŭ eŭskigo de originala esperanta libro.

La eŭska e-o agado ne reduktiĝas al la lokaj grupoj kaj asocioj, kaj kiel klare percepteblas en la kazo de Aitor Arana, personaj iniciatoj ebligas konstrui kaj utiligi "eŭska-esperanto"- "esperanto-eŭska"n komunik-vojon.

Alvokoj por partopreni internaciajn renkontiĝojn kaj kongresojn frapas niajn agendojn, vi povos trovi anoncojn pri kelkaj el ili en la lastaj paĝoj, ĉiuokaze oni konsciis, ke temas pri eta selekto de longa listo. Se vi volus pli da informoj bonvolu viziti la sidejon aŭ trafoliumu "Eventoj"n, "Heroldo"n, "Esperanto"n ktp.

Plaĉe legu.

La redaktoro.

ASOCIAJ NOVAJOJ

* La prezidanto de Alava E-Asocio, kaj veterana kunlaboranto de KUSPE, Natxo Apaolaza instigis de Februaro profundan debaton pri la nuntempa situacio de la asocio. Temis pri kvar asembleoj kie la asocioj, kun la helpo kaj gvido de raporto farita de Natxo, esprimis siajn pensojn pri la atingoj kaj eraroj dum la naŭ jaroj de AEA. La partopreno estis sufiĉe kontentiga (ĉeeste aŭ skribe dudek-dudek da personoj kaj longedaŭraj debatoj), oni aŭdis plurajn kialojn por koni la evoluon de la asocio kaj oni pritaksis la eblojn skui la hodiaŭan pigro-tendencon.

Tion cele oni konsentis dungi po horoj membron de la asocio. Tiu homo deĵoros ĉirkaŭ dudek kvin horoj ĉiu monate, pagotaj laŭ modesta stipendio, por plenumi la plej bazajn taskojn organizajn kaj, se oni fine tiel decidus, kunordigi la aranĝon de speciala evento por celebri la dekjarigon de la asocio.

* Post publika anonco J. Ignacio López de Robles, Txopo, prezentis sin por plenumi ĉi-tiun postenon. Li deĵoros dum la venontaj dekdu monatoj. Post tiu-ĉi periodo oni rekonsideros ĉu pludaŭri per tiu sistemo aŭ ne.

Ni atentigu pri la fakto ke Txopo estos la deĵoranto sed tio ne signifas, ke li devas respondeci pri ĉiaj taskoj. Male, la membroj de la asocio devos pli respondece implici en la komunaj kaj minimumaj taskoj, nome, korekta utiligo de la lokalo, purigado, ordigo de materialoj, helpo en pli konkretaj iniciatoj ktp. Se ni ne agas tiel preskaŭ certe tiu klopodo ĝigos vana.

* Oni elektis novan !? estraron, jen ĝiaj membroj:

Prezidanto: Natxo Apaolaza Beltrán de Gebara.

Sekretario: David Sánchez Agirregomezkorta, Truto.

Kasisto: Rafael Blanco Arbe

Voĉdonantoj: Xabier Armendaritz Glez. de Langarika, Isabel Aspe Montoya, Iñaki Atxaerandio Alexanko, José Ignacio Lz. de Robles Dz. de Gamarra, Xabier Rico Iturrioz kaj Rakel Rivera Hernando.

* Oni decidis plialtigi la jaran kotizon ekde la venonta jaro. Do, ne maltrafu la ŝancon por pagi mil pesetojn por la lasta fojo, ĉar de 1997 la nova kotizo estos 2.000 pesetoj. Se vi anstataŭ mane preferas pagi per la banko, jen niaj ŝparkas-konto numeroj :

Caja Vital Kutxa : Alava Esperanto Asocio. 32920-1.

Caja Laboral. Euskadiko Kutxa : " " 099 0 00476 3

* Finfine oni povas admiri la ŝildon de la asocio sur la muro de la palaco kie troviĝas nia sidejo. Ni devas dankegi la aŭtoron de la verko pro lia sindediĉo, zorgo kaj arto. Post trimonata "erasmumado" en Marsejlo, Txelu denove troviĝas en Gastejso. DANKEGON, Txelu.



La ŝildo dum ĉi-vintra neĝo.


* La 26an de Majo okazos renkontiĝo kun membroj de la Ĝironda E-o grupo en Bajono. Vi ĉiuj estas invititaj partopreni. Tute certe ni eliros la sabaton 25 an por tranokti en junular-gastejo en Hondarribia kaj ĉskursi en la ĉirkaŭaĵoj. Se vi interesiĝas telefonu la antaŭajn tagojn al Rafa aŭ Truto (vidu Utilajn Adresojn)

* Ni memorigas vin, ke kiel ĉiujare ni festos la, ĉe ni de kelkaj jaroj tradiciajn, florajn ludojn. Se vi havas ideon aŭ proponon sciiĝu ĝin al ni. Kiel kutime ĝi okazos fine de junio, ankaŭ bonvenas sugestoj pri la tago(j) por ĝin okazigi.

* La vendedraj vesperoj estos denove e-paroligaj. Xabi, Isabel kaj Rakel ebligos tiun eblon. Ili pretigos malsamajn aranĝojn (prelegojn, debatojn, ludojn) por animi la asocian aktivadon kaj praktiki la lingvon, vi povas informiĝi pri la "menuo" de ĉiu vendredo telefonante al ili aŭ al la estraranoj.

* Ankaŭ dimanĉe matene eblos viziti la lokalon. Ankoraŭ oni ne fiksis la horaron sed plej certe ĝi estos de la 11a ĝis la 13a. Iŝaki kaj Txopo efektivigos tiun eblon.

* Ni estas konsiderantaj akcepton dum parto de junio de la internacia Cseh instruisto Aristóphio Alves kaj lian edzinon Núbia. Ili estas brazilanoj kaj post restado en Katalunio povus gastigi ĉe ni por gvidi kurson, prelegi pri Brazilo ktp. Tial ke oni ne prenis definitivon decidon ni nun ne povas certigi tiun aranĝon sed ni anoncos la tagojn kaj kursojn kiam ni estos certaj pri ĉio.



INTERNACIA PANORAMO

Kiel mi jam antaŭvidis en mia lasta artikolo, en Nordirlando I.R.A. rekomencis la perforton, post la brita blokigo de la pacproceso. Kiel preskaŭ ĉiam, bedaŭrinde, la perforto iĝis efika iamaniere, kaj rekomenciĝis ankaŭ la dialogo, kaj interrompo de la sangoverŝado.

Tamen mi vidas la panoramon pesimisme, konsiderante, ke kaj brita registaro (kiu pro sia malforteco en Westminster estas aŭtonomiomanka), kaj la unionismaj partioj volas cedi neniom, kaj nur volas devigi I.R.A. forlasi la lukton, kvazaŭ nur la respublikanoj dezirus kaj bezonus pacon, kaj unionismaj povus elteni la militon eterne. Ili tute eraras pensante, ke paco estas senpaga aŭ ke la pago devas esti alfrontita nure de la kontraŭanto.

Sammaniere tute eraras Jelcin, kiu per unu mano ofertas pacplanon al Ĉeĉenio, kaj alimane ordonas aviadilbombadojn, kaj atakojn al ĉeĉenoj, kiuj donas al mondon lecionojn de heroismo. La lastaj novaĵoj estas mortigo de Dudajev, kaj de lia sekvanto (tiu ĉi, poste konfirmiĝis malvera), supozeble, fare de Caro Boris kiu deziras, ne ĝuste pacon sed venkon por havi ian eblecon venki la prezidentajn balotojn al siaj kontraŭantoj, Ziuganov kaj Ĵirinovski. Nedudeblas ke sendepende de morto aŭ ne, de ĉeĉenaj prezidentoj, milito daŭros, kaj ĉeĉenoj ne rezignos, pro perdo de siaj lideroj.

La situacio de Rusio estas grave komplika, tial ke krom propraj etnaj problemegoj, rusa parlamento, mane de la komunismaj reprezentantoj "resurektigis" Sovetunion, kaj eĉ Jelcin mem atingis konfederacion kun Bjelorusio (decido forte kritikita de bjelorusa naciismo), kaj aliajn traktatojn kun Kazahio aŭ Kirgizio, inter aliaj. La timo disvastiĝas inter la ekssovetaj respublikoj.

Ankaŭ en Malproksima Oriento, komunismo kaj naciismo kreas eksplodan koktelon. Popola Ĉinio tre klare minacas "Naciisman" Ĉinion (Tajvano). Temis pri avizo, sed estas evidenta, ke Popola Ĉinio, kiu en 1997 kaj 1999 reakiris Hong-Kongon kaj Makaon respektive, kaj aplikos la politikon "Du sistemoj, Unu lando" permesante la kapitalismon en Hong-Kongo (pli dubindas la kazo de Makao, ekonomie multe pli malgrava), neniam permesos "Sendependiĝon" de Ĉina Respubliko de Formoso insulo.

Aliflanke ankaŭ militaj ventoj blovas en Korea duoninsulo. Norda respubliko post akordo kun Usono forlasi atombombajn planojn, nun premas per invadetoj de la neŭtrala zono, cele atingi rektan pactraktaton kun Usono, kaj atingi ekonomian helpon por flegi la katastrofan situacion de la lando, kiu suferis gravajn inundojn, kiuj minacas per malsato la popolon. Eble okazos nenia armita konflikto, sed la nuna lidero de lando, filo de Kim Il Sung, mortinta antaŭ ne tro da tempo, kiu ŝajne havas problemojn kontroli la povon, kaj samtempe onidire ne estas tre fidinda homo povas konduki la situacion al enantaŭena fugo. Ĉio povas degeneri en duan korean intercivitanan militon. Ĝi eble unuigus la landon kiun dividis la unua.

Alia komunisma lando kiu suferas per malsato estas Kubo, kiu sentis streĉi la usonan blokadon pro nova leĝo Helms Burton, kiu kontraŭas la internaciajn leĝojn. Ankaŭ naciismo ludas ĉi tie gravan rolon, kaj ankaŭ ĉi tie estas du Kuboj, same al du Ĉinioj, aŭ al du Koreoj, kaj ankaŭ ĉi kaze Usono apogas unu parton. Tiu dua Kubo ne havas teritorion, sed lokiĝas en Miami. La Insulo rezistas, eĉ se ili devas ataki la kontraŭkastrismajn aviadilojn.

Tiuj kiuj ne povis faligi aviadilojn estas la militantoj de "Hizbullah" kaj tial suferis terurajn bombatakojn fare de Izraelo. Libano denove alfrontas grandan danĝeron, post kelkaj jaroj de iuspeca paco. Hizbullah, kaj Libano mem estas do, nuraj instrumentoj por la lukto inter Sirio kaj Izraelo. Peres volas pacon kun Sirio, sed por tio necesas venki venontajn balotojn, kaj tial devas montri sin kiel firman lideron antaŭ juda popolo kies unua celo estas sekureco. Krome Hizbullah estas ankaŭ peranto de integristaj palestinanoj, ĉar ili ricevas de Peres la batojn kiujn preferas ne doni al palestinanoj. Finfine oni interkonsentis akordeton por forlasi atakojn al nemilitistaj celoj. Kiel ĉiam Izraelo venkis.



Natxo Apaolaza

Intervjuo al Aitor Arana

Aitor Arana Luzuriaga (1963, Legazpi) esta ĉefe konata kiel aŭtoro de kelkdeko da porinfanaj libroj en la eŭska lingvo. En 1990 li gajnis per «Afrikako semea»¹ [t.e. «La filo de Afriko»] la tiu-jaran Premion Azkue kaj samjare publikigis la eŭsk-lingvan lernolibron de Esperanto «Esperantoa ikasgai»². Mult-faceta, Aitor senĉese verkas, tradukas kaj regule kontribuis al la literaturaj gazetoj «Xub» kaj «Hots», kies redaktoro li estis dum pluraj jaroj. Antaŭ nelonge li elpaŝis sur la kampon de la erotika literaturo -ĝenro apenaŭ kultivita en ĉi tero de monaĥejoj kaj zelotoj- per serio da edife malĉastaj rakontoj. Krom tio, li kompilas atendatan vortaregon Eŭska-Esperanta-Eŭska, kiu espereble povos baldaŭ vidi la lumon.

Kiam vi konatiĝis kun Esperanto kaj kio instigis vin ellerni ĝin?

Kiam mi estis 19-jara, amiko parolis al mi pri Esperanto. Tiam ĝi ne allogis min: mi ja ne deziris lerni novan lingvon. Se tiam mi eksciintus ne nur pri la lingvo internacia, sed ankaŭ pri ĝiaj ĉirkaŭaj celoj, eble mi tuj eklernus ĝin. Sed tio ne okazis ĝis post du jaroj, kiam mi legis en ĵurnalo artikolon pri Esperanto kaj plurajn lingvo-ekzemplojn pri ĝia logiko.

Iam mi aŭdis al vi diri, ke vi ne konsideras vin esperantisto sed esperantano. Bonvolu klarigi la diferencon, Aitor.

Jes, certe mi ne sentas min esperantisto, sed nur «esperantano». Esperantisto ne, ĉar mi ne laboradas por la disvastigo de Esperanto, nek instruas ĝin. Esperantano jes, ĉar mi fakte estas ano de Esperantujo, kaj parolas ĉiam en Esperanto kun neeŭsk-lingvaj esperantistoj.

Estas sciante, ke multaj esperantistoj rifuzas aktivi en la movado [pri kio mi ja ne kulpigu ilin: abundas la kialoj por senti sin naŭzata de certaj sektoroj de la esperantistaro]. Tamen aliaj esperantistoj restas izolitaj pro simplaj geografiaj kaŭzoj. Vi ja estas la sola esperantisto en Gipuzkoa (?), sed ĉu nur al tio ŝuldiĝas via relativa «izoliteco»?

Sendube mia izoliteco ŝuldiĝas al tio, ke mi mem estas iom nesocietema. Ekzemple mi neniam ĉeestis Esperanto-renkontiĝon, ĉar kunsidoj kaj kunvenoj kie partoprenas amaso da homoj ne tre plaĉas al mi. Sed tio ĉi okazas al mi ne nur rilate al la Esperanto-movado. Ankaŭ

en mia metio, t.e. eŭsk-lingva verkado, mi spertas la samon. Babilante kun alia verkisto, mi ege ĝuas, sed kiam mi partoprenas ekzemple kunsidon de verkistoj, kutime mi restas silenta kaj aŭskultas sen interveni.

Ni scias, ke vi pretigas de antaŭ longe vortaron Eŭska-Esperanta-Eŭska. Bonvolu komenti pri la ekesto de tiu ideo kaj pri ĝia aktuala stato.

Antaŭ naŭ jaroj mi komencis verki ĝin kaj post kvin jaroj finis. Sed tiam mi ekkonsciis, ke ankoraŭ mankas multaj vortoj. Tial, sciante ke vortaro neniam estas tute finita, mi decidis almenaŭ ĝin kompletigi kaj poluri. Mi ja sciis, ke vortaro-farado estas tasko ne de unu homo sed de labor-grupo. Multaj Esperantaj vortaroj estas kaj estos kompilitaj de nur unu aŭtoro, sed poste ilin revizias alia(j) esperantisto(j).

Komence mi trovis kunhelpanton en Alavo, sed post pluraj nefrukto-donaj monatoj estis evidente, ke nia kunlaborado ne antaŭeniras. Krome, tute neatendite, estiĝis grava problemo, aŭ almenaŭ tia ĝin konsideris mia kunlaboranto. Nome li volis scii pri la aŭtor-nomoj de mia vortaro sur la titol-paĝo: «Kiu(j) nomoj aperos?», li demandis. Surprizite mi pensis: «Ĉu gravas nun okupiĝi pri nomoj, kiam ni devos labori ankoraŭ plurajn jarojn por kompletigi la vortaron?». Nu, tio estis la komenco de la fino de nia kunlaborado.

Feliĉe mi konis post nelonge la nederlandan esperantiston Win Jansen, kiu regas ankaŭ la eŭskan lingvon. Mi proponis al li revizii mian originalaĵon kaj -dank' al Dio- li akceptis. Nuntempe la eŭska-Esperanta parto -konsistanta el 30.000 vortoj kaj 45.000 konceptoj- estas jam kompilita kaj S-ro Jansen korektis ĝis la litero «k». Do mi kalkulas, ke la vortaro estos tute finita post du jaroj. Espereble...! Mi arde esperas, ke ĝi estu preta ĉi-jarcente!

Sed, krom vortarumi, vi ankaŭ tradukas...

Jes, mi de tempo al tempo esperantigas eŭskaĵojn kaj eŭskigas esperantaĵojn, sed bedaŭrinde mankas al mi sufiĉa liber-tempo por tradukado. Antaŭ jaro kaj duono mi esperantigis «Behi euskaldun baten memoriak»³ de Atxaga, en esperanta vesto: «Memoraĵoj de eŭska bovino». Kaj kial ĝuste mi elektis ĉi verkon? Nu, simple mi ne povis cedi al la tento redoni en Esperanto la amuzajn kaj ĉarmajn aventurojn de nia kara bovino Mo. La malneto estas nun reviziata de nord-amerika esperantista amiko kaj poste ĝin relegos alia esperantisto alilanda. Mi esperas eldoni ĝin en aŭtuno ĉi-jara.

Aliflanke mi tradukas nun la amuzan epizodaron: «El la vivo de bervalanta sentaŭgulo»⁴. Ĝia eŭska titolo tekstos «Esperantista sutsu baten gorabeherak», kiu ja ŝajnas al mi multe pli esprimiva ol la originala. Feliĉe mi sukcesis trovi eldonejon kaj venont-jare ĝi publikiĝos.

Kian rilaton vi havas kun la literaturo, originala kaj tradukita, en Esperanto? Ĉu vi sentas ian preferon por iu skolo?

Bedaŭrinde mi ne sufiĉe profunde konas la diversajn literaturajn skolojn en Esperanto, kvankam mi ja legas esperante kaj ĝuegas! Miaj plej ŝatataj aŭtoroj estas István Nemere kaj Lorjak, kies romano «Regulus»⁵ kaptis mian atenton de la unua paĝo ĝis la fino. Sed plaĉas al mi ankaŭ aliaj legaĵoj kiel «La malgranda sorĉistino», «Asteriks», «El la vivo de bervalanta sentaŭgulo», ktp. Mi ĉefe kaj plezure legas en Esperanto porinfanajn literaturaĵojn. Ne forgesu, Joxemari, ke precipe tiajn librojn mi verkis en la eŭska lingvo...

Laŭ via opinio, Aitor, je kio lamas Esperanto kiel literatura lingvo? Mi parolas ekzemple pri manko aŭ nedisvastigo de frazeologio, nesufiĉa vortprovizo... Aŭ male, en kio ĝi senrivale suverenas kompare al aliaj lingvoj?

Mi pensas, ke nek mankas, nek superfluas io ajn. Ĉiuj naturaj lingvoj estas en larĝa mezuro nuanc-havaj, sed samtempe iomete mank-havaj. Tute egale pri Esperanto. Tamen mi tuj konfesu, ke Esperanto pli kaj pli surprizas min montrante nuancojn tre malfacile tradukeblajn al aliaj lingvoj.

Forlasinte la porinfanan ĝenron, antaŭ nelonge vi publikigis mejlo-ŝtonan rakontaron en la eŭska lingvo: «Ipuin Lizunak» [t.e. «Malĉastaj rakontoj»], karakterizitaj dors-kovrile per la enigma frazo «rakontoj legindaj per unu mano». Kion vi celis per ĉi libro kaj kiel akceptis ĝin la publiko?

Mi intencis plenigi truon en nia eŭska literaturo. Nekredeble preskaŭ ne ekzistas eŭske malĉastaj legaĵoj, kaj pluraj el tiuj malmultaj estas tradukaĵoj. Krome ne klare videblas, kiu verko estas erotika, malĉasta aŭ porna. Mi propra-intence verkis dek kvin malĉastajn rakontojn pri plej diversaj seksumoj kaj fik-manieroj.

Vi demandis ankaŭ pri ĝia akcepto. Nu, mi donu al vi nudan ciferon, ke la leganto mem faru al si ideon: en unu jaro vendiĝis preskaŭ 700 ekzempleroj.

Kiuj novaj projektoj ruliĝas en via kapo?

Nuntempe okupas min precipe eŭsk-lingvaj noveloj kaj romanoj, ĉu

por infanoj, ĉu por adoltoj. Ĉi-jare oni eldonos al mi du aŭ tri librojn. Tio ja estas tre kontentiga por verkisto! Pasint-jare mi verkis romanon titolitan «Aita-semeak» [t.e. «Patro kaj filo»], kiu aperos aŭtune. Kaj ankaŭ en aŭtuno espereble publikiĝos mia «Gaueko ortzadarra» [t.e. «La nokta ĉiel-arko»]. Krome mi intencas verki novan porinfanan rakontaron.

Ĉu vi iam pensis verki originale en Esperanto?

Foje mi pensis, sed mi ne konas esperantajn eldonejojn. Mi estas ja verkisto kaj, kompreneble, klopodas vivi de miaj libroj. Kaj tio ĉi fakte estas ege malfacila afero, des pli se temas pri lingvo tiel malgranda kiel la eŭska. Tamen mi ne tute fermas la pordon al la eblo verki ankaŭ en Esperanto. Pli ekzakte, mi intencas baldaŭ esperantigi mian lastan romanon, «Aita-semeak».

Intervjuis Joxemari Sarasua

¹ Aitor Arana. *Afrikako semea*. ELKAR. Donostia, 1991.

² Aitor Arana. *Esperantoa ikasgai*. HOTS. Legazpi, 1990.

³ Bernardo Atxaga. *Behi euskaldun baten memoriak*. Pamiela. Iruñea, 1991.

⁴ Louis Beaucaire. *El la vivo de bervalva sentaŭgulo*. UEA. Rotterdam, 1989.

⁵ Lorjak. *Regulus*. Ascoli Piceno. Gabrielli, 1981.

⁶ Aitor Arana. *Ipuin lizunak*. R & B Ediciones. Donostia, 1994.

Esperanto

Curso del Idioma Internacional

Malmultaj radikoj sed MULTAJ ekzemploj
Modernaj desegnoj. Ses apendicoj
Kudrita bindo kaj kolora kovrilo
Kaj aparta kajero kun la solvo
de ĉiuj proponitaj ekzercoj

**Prezo (libro + kajero): nur 1.500 ptoj. Aĉetebbla ĉe
la Libroservo de Grupo Esperantista de Bilbao.**

LA LEGEMULO

(NIA LITERATURO SPECIMENE...)



Kálmán Kalocsay (1891-1976)

ESPERANTA POETO

LUDO

Ho ludo, dolĉa ludo, vi saĝo de sensenco,
oaz' de freŝaj fontoj, malgranda paradizo,
loganta el dezerto de nia vivogrizo,
por ĉiuj vivozorgoj plej rara rekompenco!

Nobliĝas per vi proza krudeco de l' esenco
de l' tera amo; kovras, per sorĉa improvizo,
ĉion kulisoj feaj kun brilo kaj irizo,
patrino de Scivolo, de Arto, de Scienco.

Ho, se ni fine lernus ekludi jam sen masko!
Ne plu posedavide, glavtinte, trompe, turpe,
ne kun ponard' kaŝita perfide sub la basko,

sed gaje kaj sincere, sencele kaj senkulpe,
kiel la bunta brilo de plumoj de kolibroj,
aŭ kiel sur kristalo irizaj lumovibroj.

GRUOJ

En triangulo
La grupoj grege iras.
Liter' giganta!
Mi volus VO prononci,
Sed VE mi elsuspiras.

KRIZO

Pli longe ami
Iun ol tiu amas
Aŭ malpli longe:
Ĵaluzo aŭ kompatato:
Turmento preskaŭ samas.

SUR LA MONTO NEBO

La gren' inundas. Riĉon vome jetas
Maŝinoj. Fluas kun miel' kaj mosto
La akvoj. Flugas por la Pentekosto
Elektraj langoj. Paradizo pretas.

Scienco pompas. Brila art' raketas.
Kaj tamen grincas nur malsat' kaj frosto.
Ho kruda Fato, tranĉa ĝis la osto:
La tempoj grandas kaj la homoj etas.

Nur kelkajn ĝustajn paŝojn, kaj la vojo
Trakurus kampojn de eterna ĝojo,
Sed — ĉie blinda kaj malica strebo.

Atendus prete nin la Kanaano,
Sed ni, en lupa lukto por la pano,
Mizere mortas sur la monto Nebo.

el SEKRETAJ SONETOJ

XLIX

Eble milfoje sentis ni sangbolon,
Dum en ardglua kuŝ' apudis ni,
Milfoje al la korpoj trudis ni:
Adori per ofer' la am-Idolon.

Kaj ĉiun ardan, artan am-petolon
Senlace, amdonace ludis ni,
Fervore provis kaj elstudis ni
En ĉiu poz' la tutan aman skolon.

Sed ĉiam kun la sama intensiv'
Nin la momento de l' Ekstaz' perfortas,
Kaj kiam per nerezistebla driv'

Nin flamrivero de Volupto portas,
Dum tiu ĉi centobliĝinta viv'
Sertore ni ekĝemas: «Ve, mi mortas!»



Pri "Sekretaj Sonetoj" ("Libro de Amo"),
vidu anoncon en alia pago ĉi-numera.

L

«Mi mortas!» Jes, ni mortas. Ho mistero!
En frosta solo de la homa sort'
Sopiras ni je tiu sava mort',
Ĉi morton serĉas ni en malespero.

La homa korp', la dissplitita ero,
En ŝira treno de potenca Fort'
Obeas al la ordonanta vort'
De l' frata paro: Morto kaj Genero.

El orfa solo de l' individu'
Ni serĉas nin, ke save ni komunu,
Ni kunfrapiĝas en ardanta glu',

Ke ni ekbrule kaj forbrule kunu,
Kaj el la cindroj de l' mortema Du,
Fenikse levu sin la sankta Unu!



Kálmán KALOCSAY [ka! loĉai] (1891-1976). Kuracisto, doktoro de medicinaj sciencoj, univ. profesoro, esperantisto de 1911, akademiano de 1949, ĉefredaktoro de "Literatura Mondo" en ties ĉiuj tri periodoj, estas unu el la ĉefaj figuroj de la E-a poezio.

Liaj originalaj poemoj elstarigas lin kiel majstro de la lingvo: "Mondo kaj Koro" (1921); "Streĉita Kordo"; "Rimportretoj" (1931); "Izolo" (presitaj en 1938, sed eldonitaj nur en 1977!); "Ezopa Saĝo" (1956). En 1932 aperis liaj "Sekretaj Sonetoj" sub pseŭdonomo (Peter Peneter) k en 1969 ties dua eldono en la volumo "Libro de Amo", kies novajn poemseriojn verkis parte la "filo" sub ps.nomo (Georgo Peterido Peneter). En 1990 aperis, ankaŭ sub pseŭdonomo (Emiano Imby), lia verko "La Dekdu Noktoj de Satano", ankaŭ kiel la antaŭa kun temo: amoro k senĝena erotiko.

Lia traduka verkaro montras lin la plej granda ĝisnuna lingvo-artisto: "Johano la Brava" de Petőfi (1923, reviziita eldono 1948), kun pliaj poemoj de Petőfi ĝi represiĝis triafoje en "Libero kaj Amo" (1970); "Tragedio de l' Homo" de I. Madách (1924, reviziita trad. 1965); "Morgaŭ Matene" de Fr. Karinty (1923); "Eterna Bukedo" (1931), poemantologio el 22 lingvoj; "Romaj Elegioj-Taglibro" de Goethe (1932); "Infero" de Dante (1933); "Hungara Antologio" (ĉefredaktoro, 1933); "La Floroj de l' Malbono" de Baudelaire (kuntradukinto, 1956); "Reĝo Lear" (1966); "Somermeznokta Songo" (1967), kaj "La Tempesto" (1969) de Shakespeare; "Kantoj kaj Romancoj" de Heine (kuntradukinto, 1971); "Tutmonda Sonoro" (inter-nacia antologio, 1981)...

Lia originala prozo estas ĉefe lingvistika kaj poetika: "Lingvo Stilo Formo" (1931). Kun G. Waringhien li verkis du gravajn librojn: "Parnasa Gvidlibro" (1932, kun ankaŭ R. Bernard reviziita eldono en 1968), kaj "Plena Gramatiko de Esperanto" (1935, tralaboritaj eldonoj en 1938, 1980); "Vojaĝo inter la tempoj" (1966). Eminente bonstilaj, sed malpli gravaj estas liaj prozaj tradukoj...

Li ankaŭ redaktoris la lingvan fakon de "Enciklopedio de Esperanto" (1933-34) kaj aliajn versokolektojn.



Esti re-dakt-oro

Alia tago kun leter-kesto plena de Esperantaĵoj. Esperanto-gazetoj - multaj el ili kun naci-lingvaj tekstoj. Se mi ĉion komprenus... Kial ni havas internacian lingvon, se ni ne uzas ĝin? Ĉu la plejparto de esperantistoj estas nur simpatiantoj..?

Nu, ankoraŭ tri semajnoj ĝis la eldono... Venis nur kelkaj aliĝiloj kaj verbaj informiloj, sed veraj artikoloj... ankoraŭ mankas. Nenio nova.

Ankoraŭ du semajnoj ĝis la eldon-dato. Stulta informilo de AEIOU el Francio venis hodiaŭ. Ili volas forigi la ĉapelitajn literojn. Denove ili, tiuj fiuloj. Ili ankoraŭ ne komprenis, ke Esperanto de ĉ. 90 jaroj estas lingvo, ne plu projekto! "Yes! Sidiju kai taipu!" [Jes! Sidiĝu kaj tajpu!] ili skribas. Mi pli emas ekstari kaj sendi al ili leter-bombon!! Des pli ridinde: ili montras bildon kun ulo malantaŭ komputilo. Sed ĉiu Esp-a komputil-posedanto scias, ke literaroj kun Esp-aj literoj haveblas senpage. Ili prefere diskonigu Esperanton ol stulte disvastigi sensukcesajn reform-projektojn!

Ho, jen venis rete kelkaj por-gazetaj informoj. Terure, ĉiu teksto (precipen tiun skribitan ennomen den konatan aŭtoron) havas monteton da skrib-eraroj.

Kiu diris, ke esti redaktoro estas io agrabla?! Ĝis nun mi nur du aŭ trifoje povis konfirmi tiun diron.

Dufoje mi ricevis kasedon por recenzi. Kaj unufoje venis eĉ libro... aŭ ne, tiun mi devis ja pagi.

Kaj la petoj. Ho, la petoj..! Plej strangaj petoj. Homoj, kiuj petas korespondon.

Nu, bone: tiujn mi povas publikigi en la "kanguruo". Sed ankaŭ personaj petoj... Iu ĉino kiu invitas min pruntedoni al li plurcent dolarojn por lia ekonta firmao. Iu polo, kiu volas produkti seks-videon (la akuzativon ankaŭ li ĉiam laŭplaĉe uzis en sia letero).

Leteroj de homoj, kiuj serĉas laboron en Svisio kaj aliloke en Eŭropo. Petoj transpreni la redaktorecon de aliaj Esperanto-gazetoj. Nelegeblaj petoj -mi supozas, ke estis petoj, sed post 4 minutoj da pena provo malĉifri ies man-skribon mi forĵetis la skribitaĉon. Ne, dankon! Homoj, skribu legeble, se vi volas ion de aliulo (ke tion mi devas mencii, devus esti memkompreneble!).

Tamen, ne ĉio estas nur aĉo. Venis eĉ kuraĝigoj (ĉirkaŭ tri) dum tri-jara redaktoreco. En Esp-ujo tio estas certe granda sukceso. Do, mi kontentu...

Ankoraŭ unu semajno ĝis la forsendo...

rolfo

*El "I'svisa kanguruo", dec. 1995/
"Eventoj", 2-jan. 1996*



Deziras korespondi

• Mara Timermane, 35-jara sinjorino, biologo laŭ profesio, interesigas pri turismo, naturkuracado, etnografio, kulturo kaj naturo. Ŝi interesangus opiniojn pri laboro de sendependa disvastigado de naturproduktajoj kaj kosmetiko.

• Una Timermane, 14-jara fraŭlino, komercantino, interesigas pri kosmetiko, moderna muziko, vojaĝoj...

Adreso de Una kaj Mara: Kr. Valdemara 145/ I-32 Riga, LV-1013. Latvio.

• Klaus Spielvogel, 33-jara, interesigas pri fotografio, migrado kaj biciklado tra longaj distancoj. Dum la lasta somero li vizitis Eŭskion kaj entuziasmiĝis pro ĝiaj homoj kaj la pejzaĝoj. Tial li volas interkonatiĝi kun personoj de nia lando.

Adreso: Klaus Spielvogel. Am Blockhaus 11.
D-52074. Aachen. Germanio.




Nin salutas

• Ekde Trieste, Italio, Elda Doerfler, sekretario de Triesta E-o Asocio gratulas la redakcianojn de KUSPE pro la enhavo sprita kaj verva de nia revuo. Ŝi ankaŭ kuraĝigas nin en la pro- kaj per-esperanta agado.

Dankon pro via reago kaj atento, Elda. Plej korajn kaj amikajn salutojn al la triesta esperantistaro.

• Ankaŭ nin salutas el Sabadell Llibert Puig, nome de Kataluna E-o Asocio. Li atentigas nin pri la fakto ke li ne estas peranto de UEA en Katalunio, kiel ni erare aperigis en la lasta numero de KUSPE. La peranto estas Kataluna Esperanto Asocio, kun kiu estus taŭga plifortigi niajn rilatojn.



LIBRO DE AMO

*"Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."*

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanenco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

*Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter estas pseŭdonimoj de **Kálmán Kalocsay** (vidu ĉi-r-numeran sekcion **LA LEGEMULON**).

81^a UNIVERSALA

PRAGO, 20-27 JULIO

KONGRESO

"La moravia folkloro al la mondo"

ĜIN ĜUU

Kultura Esperanto-Festivalo 5

Kopenhago


6-11 Aŭgusto 1996

INTERNACIA
ESPERANTO-KONFERENCO
en Pribylina, SLOVAKIO

12-18 julio '96

*Esperanto kaj Imperiaj Lingvoj
en internacia uzado*

Debatoj, Voĉdonado por
OSIEK-premio



Informoj, aliĝoj : Esperanto, Regiona Societo, Sobotské námestie 36,
SK-058 01 Poprad, Slovakio, tel/fakso (++42-92) 324 19
Eric LAUBACHER, 1 rue des Vosges, FR-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio
tel [33] (1) 30 96 67 91, rete: eric @ frmug.fr.net.

52a **IJK**

Güntersberge
(Germanio)

29-7 / 5-8.1996

Formoj de kunvivado



EMA-96

11-17 de aŭgusto

Ejselmera Migra
Aventuro

IJSSELMER
(NEDERLANDO)



BET-32

32aj Baltiaj

E-Tagoj

2-10 aŭgusto

JŪRMALA
(LATVio)

